# la informilo

## informbulteno pri esperanto

**BULLETIN BILINGUE D'INFORMATION SUR L'ESPERANTO**

ELDONISTO : esperanto-federacio de ORIENTA FRANCIO

*Editeur : Fédération Culturelle de l'Est pour l'Espéranto*
*Maison des Jeunes et de la Culture*
*27, rue de la République - NANCY -*

*trimestriel*
Nouvelle série
N°6
2e trimestre 1974



*Abonnement*
Un an : 5F
le N° : 1,25 F
*(1 jaro : 6 internaciaj respondkuponoj)*

# * Le Conseil Général du Nord vient d'adopter à son tour une motion en faveur de la diffusion de l'espéranto.

CE SONT DONC 20 CONSEILS GENERAUX QUI ONT APPORTE A CE JOUR UN SOUTIEN EFFICACE A LA DIFFUSION DE L'ESPERANTO, EN DEMANDANT SON ENSEIGNEMENT OFFICIEL AUPRES DES AUTRES LANGUES.

En voici la liste : Ardèche, Bouches-du-Rhône, Cher, Charente, Gironde, Hérault, Isère, Puy-de-Dôme, Pyrénées Atlantiques, Sarthe, Allier, Corrèze, Creuse, Eure-et-Loire, Haute-Garonne, Dordogne, Rhône, Lot et Garonne, Val de Marne et Nord.

*Nous pensons qu'il est intéressant de présenter à nos lecteurs la motion adoptée à l'unanimité par le Conseil Général du Puy de Dôme, motion qui synthétise les arguments dont s'inspirent la plupart de nos édiles départementaux :*

Le Conseil général du Puy de Dôme, considérant :

- que l'expansion de la langue internationale Espéranto est susceptible de favoriser une meilleure communication et par là même une meilleure entente des peuples,
- que l'usage de cette langue peut servir à la démocratisation de la culture, sa facilité d'assimilation la rendant accessible à tous,
- qu'elle compte déjà plusieurs millions d'utilisateurs en France comme à l'étranger, notamment dans le monde du Travail,
- qu'elle est enseignée dans plusieurs pays et dans une trentaine d'universités dans le Monde,
- considérant notamment les résultats encourageants acquis depuis son introduction en 1969 comme matière à options à la Faculté des Lettres de Clermont-Ferrand où 70 étudiants de 1ère et 2ème années sont inscrits aux deux cours :

EMET le VOEU :

que la langue internationale Espéranto soit reconnue comme langue officielle à tous les degrés de l'Enseignement et que pour permettre sa diffusion, des professeurs d'Espéranto soient formés dans le cadre de l'Education Nationale.

UN PRESIDENT de la REPUBLIQUE PRESENTE A LA RADIO, en ESPERANTO, ses BONS VOEUX AU MONDE ENTIER.

*C'est le Docteur Franz Jonas qui s'est ainsi adressé à Vienne à tous les espérantophones du monde, les 29 et 30 décembre 1973. " Tous ensemble, animés du même esprit, travaillons à instaurer une véritable compréhension internationale. Que tous nos efforts tendent à ce vaste idéal : la Paix du Monde ! "*

PLUS de 2 200 OUVRAGES en ESPERANTO à la BIBLIOTHEQUE MUNICIPALE !

C'est la ville belge de Kortrijk qui s'enorgueillit de posséder une telle collection. De nombreuses bibliothèques publiques commencent à mettre à leur tour, à la disposition de leurs lecteurs, toute une panoplie d'oeuvres informatives sur la langue mondiale : un exemple à suivre.

LE CHANCELIER Willy BRANDT, Prix NOBEL de la PAIX, VIENT D'ENVOYER UN MESSAGE de BIENVENUE à TOUS LES PARTICIPANTS du CONGRES UNIVERSEL de HAMBOURG (juillet 1974).

*Ces salutations, traduites en espéranto, seront imprimées dans le "Livre du Congrès". Au cours de cette même manifestation internationale se déroulera le célèbre "Concours oratoire" réservé aux Jeunes de tous les pays. Entre autres thèmes à débattre - en espéranto ! - : Nationalisme et Internationalisme dans mon pays - Les manifestations sportives internationales contribuent-elles à promouvoir une amitié par dessus les frontières ou à exacerber le chauvinisme ?...*

L'ANNEE COPERNIC, L'ESPERANTO et la TELEVISION FRANCAISE.

Plusieurs émissions régionales de télévision ont été consacrées à l'exposition itinérante de dessins d'enfants sur la vie de Copernic, dessins collectés dans 29 pays grâce à l'utilisation de l'espéranto.

L'ESPERANTO ENSEIGNE OFFICIELLEMENT dans une NOUVELLE UNIVERSITE AMERICAINE.

*Ce cours sera professé, à la demande de nombreux étudiants, à l'Université de Middeltown (Connecticut), par le titulaire de la chaire de philologie des langues d'origine latine.*

LES BEATLES . . . " OUI à l'ESPERANTO !"

Réunis à nouveau à Montréal le 1er Juillet, les membres de la célèbre formation musicale chanteront bénévolement afin de promouvoir l'utilisation de l'espéranto par les athlètes des futurs J.O. de 1976.

On évalue à près de 10 millions de dollars les différents droits de télévision, de disques et de cassettes, qui permettront d'offrir une bourse de 2 000 dollars à tout athlète qui apprendra la langue internationale.

3259 EMISSIONS de RADIO en ESPERANTO AU COURS DE L'ANNEE 1973!!

*Ce chiffre qui ne manquera pas d'impressionner plus d'un de nos lecteurs représente 1110 heures d'émissions en langue internationale à partir de 22 stations réparties dans 12 pays.*

*Radio-Varsovie se trouve largement en tête avec 730 émissions, puis vient Radio-Pékin avec 312 programmes. Radio-Berne pour sa part s'est adressé 208 fois dans l'année aux espérantophones du monde entier.*

## BONA SUKCESO DE NIA 33a KONGRESO (Orient-franca Federacio) EN MULHOUSE LA 17an de marto 1974..... *raportas André GROSSMANN.*

*– Nia ĉi-jara kongreso okazis en la urbo Mulhouse, kie en la restoracio "A l'Agneau d'Or" kunvenis ĉirkaŭ 40 personoj. Ilin bonvenigis per kelkaj salut-vortoj Sro LIENHARDT nia vic-prezidanto.*

*– Poste Sro COLNOT malfermas la kongreson dezirante al ĉiuj bonvenon, ĉefe al niaj germanaj amikoj, kiuj jam dua-foje partoprenas niajn kongresojn, kaj al la novaj lernantoj de niaj kursoj, kiuj unua-foje ĉeestas niajn laborojn. Poste li legas kelkajn salut-leterojn: de Esperantista Amikaro de Gray (70), de Sr° BOURDEAUX, vic-prezidanto de U F E, de Sr° GILOTEAUX, vic-prezidanto de Norda Federacio, de S-in° TARANTOLA.*

– Sr° GROSSMANN prezentas la agad-raporton de la jaro 1972-73, kiu estis farita komence de tiu-ĉi jaro, ĝi aperis en la "Informilo" n° 5. Sr° COLNOT kompletigas ĝin per la plej lastaj ciferoj. Li atentigas la ĉeestantojn, ke la diferenco inter la membro-nombroj de 1972-73 (111 al 112) ne estas nur unu plia membro, sed ni perdis 31 membrojn kaj gajnis 32 novajn. Inter la perditaj membroj, forpasis Sr° HEINTZ (Strasbourg) kaj Fin° RIHN (Mulhouse), honore al ili ni silento-staras.

Por la nuna jaro ni jam havas 87 membrojn, inter ili 15 novajn, kaj 98 abonantojn al la "Informilo". Sed 12 membroj ne abonis la bultenon.

Ĉi-tiu raporto estas unuanime aprobita.

*– Sr° COLNOT ankaŭ prezentas specialan raporton pri nia bulteno "La INFORMILO". Ĝi estis unue, komence de 1973, eldonita en NANCY, sed ekde la tria n°, tuj post nia last-jara kongreso, Sr° DENIS prizorgis en BAR-le-DUC, la eldonadon de la du unuaj paĝoj. Pro la bonaj rezultoj kaj favoraj kostoj la sekvantaj numeroj estis kaj estos tute eldonitaj en Bar-le-Duc. Sr° Colnot ankaŭ klopodis por peti la agnoskon de nia bulteno ĉe "Commission Paritaire de Presse" sed vane, tiu agnosko estis malakceptita. Sr° Bourdeaux malkonsilis reagi al tio, ĉar tio povus endanĝerigi la agnoskon de aliaj E°-bultenoj, interalie de F.E. Neniu regiona bulteno posedas la agnoskon.*

*Ĉi-tiu raporto estas unuanime aprobita krom unu sindeteno.*

– Sr° CHAPELLIER prezentas du kas-raportojn, la unuan pri la spezoj faritaj por la eldonado de la Informilo dum la jaro 1973. La dua estas la ĝenerala kas-raporto de nia Federacio. Ĉi-tiu estas tre bonfarta, ĉefe pro malavaraj donacoj. Ambaŭ raportoj estas unuanime aprobitaj. La kongreso ankaŭ decidas denove donaci 200 F al la fonduso domo de UFE.

*– Raportoj el diversaj urboj estas prezentitaj de la koncernaj aktivuloj. Sr° ZIPFEL raportas pri Strasburgo, kie ekestis nova komitato, kiu elektis honorprezidanton, Sron HABERMEHL. En la liceo Lucie Berger Sr° Zipfel gvidas kurson, kies organizo estis iniciatita de ne-esperantista organizo; tre sekvinda ekzemplo!*

*– Sr° DENIS raportas pri Bar-le-Duc, kies grupo estas oficiala jam de 20 jaroj kaj eĉ eldonas membro-kartojn. Per pet-leteroj tiu grupo kolektis donacojn inter la eminentuloj aŭ simpatiantoj el la urbo. Aliaj aktivuloj raportas, respektive: Sr° Lienhardt pri Mulhouse, Sr° Bergerot pri Epinal, Sr° Cuené pri Colmar. Sr° Colnot siavice prezentas tre ampleksan raporton pri Nancy kaj pri la perkoresponda kurso. Tiuj raportoj jam parte aperis en la "Informilo".*

.../...

– Intertempe alvenis Ges-oj COULON, salutante la kongreson je la nomo de la Federacio Bourgogne Franche-Comté. Ankaŭ alvenas Ges-oj PYTLOUN, ĉehaj samideanoj loĝantaj en Svislando. Ili estas varme bonvenigitaj.

– Poste la kongreso devas renovigi trionon de la komitato. La mandato de la 4 jenaj komitatanoj finiĝis: Sroj BERGEROT, DENIS, KNECHT kaj LIENHARDT. Nur Sr° KNECHT ne rekandidatiĝis, estas petataj novaj kandidatoj. Sr° Colnot profitas la okazon por antaŭ sciigi al la kongresanoj, kiaj estos la problemoj de la komitato. Sr° CHAPELLIER estas jam de longaj jaroj nia kasisto, de pli ol 36 jaroj. Dum la jaroj 1950 li eĉ funkciis sola kiel sekretario-kasisto. sed nun li tamen laciĝis kaj rajtas emeritiĝi de sia posteno. Akceptas anstataŭi lin Sr° GROSSMANN, kiu estas nun sekretario. Tial ni devos trovi novan sekretarion aŭ prezidanton.

*Je la nomo de la Federacio Sr° Colnot dankas al Sr° Chapellier pro lia multjara, kuraĝa, afabla, sindonema agado por esperanto kaj por nia Federacio kaj trans-donas al li simbolan donacon, verkaĵon de R. Schwartz.*

– Sin prezentas kiel nova kandidato Dr° VOLTZ el EPINAL. Ĉiuj kandidatoj estas unuanime elektitaj.

Laŭvice oni pridiskutas la diversajn raportojn de UFE. Oni varme aprobas la ĝeneralan administradon de la nacia asocio kaj konsideras kiel gravan paŝon la akiron de la nova sidejo en PARIZO. La voĉ-donado por la raportoj de UFE kaj por la elekto de la UFE-komitatanoj okazas skribe. La rezultoj por la raportoj estas jenaj:

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| 1-e | Agad-raporto | jes: 23 | ne: 0 | sindeteno: 0 |
| 2-e | Financa raporto | jes: 22 | ne: 1 | sindeteno: 0 |
| 3-e | Buĝeto | jes: 22 | ne: 0 | sindeteno: 1 |

– *Ĉiuj rezultaj voĉdonadoj estos transdonitaj al UFE.*

– *Sr° CUENE estos nia delegito por la nacia kongreso en St-ETIENNE.*

– *Diversaj proponoj estos faritaj por nia venontjara kongres-urbo. Sr° Colnot aparte proponas STAFFELFELDEN, kie S-in° TARANTOLA, kies edzo estas direktoro de la tiea junuldomo, jam faris diversajn klopodojn por even tuale tie organizi nian ĉi-jaran kongreson, se en Mulhouse ne estis estinta ebleco ĝin organizi. Sed ĉar fin-fine nia kongeso tamen povis okazi en Mulhouse, la klopodoj de S-in° Tarantola fariĝis vanaj. Tial, por ne perdi tiujn klopodojn, la propono de Sr° Colnot estas unuanime akceptita. En sia salut-letero S-in°.T. konfirmas al ni, ke la Junuldomo estas preta akcepti nin por nia venont-jara kongreso. Ĝi do okazos en Staffelfelden, kiu troviĝas je 10 km de Mulhouse.*

– Sr° Colnot ankaŭ komunikas peton de la Federacio de "Bourgogne Franche-Comté", kiu ŝatus aperigi siajn proprajn informojn en nia "Informilo" sur du paĝoj. Post diskutado tio ŝajnas ebla, nur necesas solvi praktikajn problemojn.

– Sr° Bourdeaux proponas staĝon pri informado kaj gazetaro kun partoprenado de esperantistoj. Iuj ŝajnas pretaj ĝin partopreni se ĝi okazos en la Federacio. Sed pri eventuala organizado la problemo ne estis solvita.

*Post la komuna tag-manĝo la nova komitato kunvenas por elekti sian estraron. La nova estraro estiĝas jene:*

| | | |
|---|---|---|
| Prezidanto: | Sr° Jean-Paul COLNOT | LAXOU |
| Vic-prezidanto: | Sr° Albert LIENHARDT | MULHOUSE |
| Sekretario: | Sr° Marcel BERGEROT | EPINAL |
| Help-sekretariino | F-in° Anna JACQUOT | EPINAL |
| Redaktoro de la "INFORMILO": | Sr° Pol DENIS | BAR-le-DUC |
| Kasisto: | Sr° André GROSSMANN | ILLZACH |
| Help-kasisto: | Sr° Jean CHAPELLIER | JARVILLE |

.../...

Membroj: Sroj Joseph BART[illegible], Strasbourg, Marcel CUENE, Colmar, Robert DURAND, EPINAL, Dr° VOLTZ, Epinal, Fredéric ZIPFEL, Strasbourg.

=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=

## NIAJ DONACINTOJ....

Kutime nia Federacio vivis nur dank'al la kotizoj ricevitaj de nia membraro. Sed de la pasinta jaro ni ree ricevis krome multajn donacojn. Jen la listo de niaj malavaroj donacintoj, al kiuj ni esprimas nian elkoran dankon:

*Jaro 1972-73 - Donacoj al nia Federacio - tiu listo aperis en la kasraporto prezentita dum la 32-a kongreso en NANCY, sed ne en la "INFORMILO"*

*Sr° Robert Roy (Vesoul): 20 F - Anonimulo: 25 F*

*Sr° Bergerot: 152 F Sumo: 197 F*

*Jaro 1973-74 - Donacoj al nia Federacio*

*Sr° Bergerot: 377 F - S-ino Oehri: 30 F - F-ino Jacquot: 20 F - Sr° Kubler: 50 F - Sr° Bloesing: 18,50 Sr° Mervelet: 15 F - Diversaj: 18,40 F*

*Sumo: 528,90 F*

*- Donacoj por la "Informilo":*

*Sr° Kremer: 57 F - Anonimulo (Bar-le-Duc): 30 F*

*Sumo: 87 F*

*- Donacoj por la Fondusa Domo (transpagitaj al UFE)*

*Sr° Etienne: 69,50 F - Sr° Reitter: 10 F*

*Sr° Josset: 5 F - F-in° Jacquot: 50 F*

*F-in° Rouillon: 50 F - Grupo de Srasbourg: 50 F*

*Sumo: 234,50 F*

*El nia propra kaso ni donacis al UFE (Fondusa Domo) 200 F en 1973 kaj 200 F en 1974.*

Kion ni faris per la donacoj ricevitaj?... Krom la 400 F donacitaj al UFE, granda parto de la ĉi-jaraj donacoj estis destinita al la opinio-sondo kaj al la propagando en nia regiono. Ĉar tiu laboro nun daŭras, ni raportos detale en la "Informilo" n° 7 pri la elspezoj dediĉitaj speciale al la propagando kaj varbado.

J.P. COLNOT

=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=

## *NOVA KASISTO, NOVA POŜT-ĈEK-KONTO....*

*Jam de 36 jaroj Sr° Chapellier estas kasisto de nia Federacio kaj sindoneme plenumis sian funkcion. Kiel vi povas legi en la kongresa raporto, dum sia lasta kunsido, la komitato elektis novan kasiston, Sr°n GROSSMANN. Sam-okaze ni decidis malfermi propran poŝt-ĉek-konton je la nomo de la Federacio.*

*Ekde nun BONVOLU SENDI VIAJN KOTIZOJN AU ABONOJN AL:*

FEDERATION CULTURELLE DE L'EST POUR L'ESPERANTO

⟶ CCP: 1 9 9 7 - 7 2 - U NANCY

.../...

La adreso de la kasisto estas (nur por eventualaj korespondaĵoj):

André GROSSMANN, Bât. D2, rue de la Doller

68110 ILLZACH

=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=

NIAJ NOVAJ DIPLOMITOJ OKAZE DE LA KONGRESO ...

Dum la orient-franca federacia kongreso okazis unua-grada E°-ekzameno sub la gvidado de Sr° Zipfel kaj tri gekandidatoj sukcesis en ĝi:

F-in° GANTNER Marie-Marguerite el MUNCHHOUSE, Gesinjoroj GODART Marcel kaj Hélène el St-DIE.

NI GRATULAS!!

=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=

OPINIO-SONDO:

Sekve al propono nia, Sr° J.L. Saudian-Rousseau, vic-prezidanto de UFE, akceptis, per letero de la 14a de majo 1973, daŭrigi de septembro ĝis decembro 73 la kampanjon de opinio-sondo. Tiurilata artikolo estis sendita samtempe al la ĉefredaktoro de "Franca Esperantisto". Sed... la konsilio de UFE verŝajne ne aprobis la projekton, ĉar nenio aperis en la nacia bulteno, kaj ni estas la sola Federacio sekve, kiu sondis opinion en la lasta trimestro 73.

Mi opinias tamen, ke tia laboro ne estis senutila, ĉar aŭtuno kaj vintro estas pli taŭgaj momentoj por atentigi pri esperanto kaj varbi lernantojn. Mi esperis viglan aktiviĝon de nia tuta membraro. Bedaŭrinde nur kelkaj personoj ĝis nun partoprenis tiun opinio-sondon. Kelkaj petis demandilojn sed ĝis nun ne rsendis ilin . NI DIRU KE NI NUN DAŬRIGAS LA OPINIO-SONDON. Vi povas ankoraŭ mendi enketilojn kaj prospektojn al nia kasisto Sr° Grossmann, kaj resendi ilin al li (post plenigado de la dokumentoj), kun eventualajn listojn de informpetantoj ANTAŬ LA 1a DE JUNIO. Je tiu dato ni sumigos la rezultojn por aperigo de raporto en la "Informilo" n° 7 .

JP COLNOT

=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=

*EĤOJ EL LA NACIA KONGRESO EN St-ETIENNE...*

*En la nomo de la estraro de UFE, Sr° Bourdeaux, vicprezidanto, dankas nian Federacion pro la donaco al la "Fondusa Domo". La sidejo estas nun finpagita, oni planas aĉeti ofset-presilon kaj fotokopiilon. La Nacia Kongreso havis grandan sukceson.*

*Novelektitaj konsilianoj estas Sroj LUEZ, Dominique DESPINEY, S-ino CASH-LIOUVILLE. La estraro de UFE ne ŝanĝiĝis krom perdo de Sr° Ballaven (ne relektita) kaj eksiĝo de sro P. Royer (sekretario pri financoj). Anstataŭe, nia delegito Sr° Cuené konsentis fariĝi "komisiito pri financoj".*

=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=

N I A  V I V O  E N  ...

STRASBURGO - Kultura Esperanto-Centro, 1 pl. Mérian.

La 12an de marto okazis la ĝenerala kunveno por voĉdone kompletigi la konsilantaron, kiu elektis novan komitaton.

Estas elektitaj: Sr° Habermehl H., honor-prezidanto. Sr° Zipfel F., prezidanto, S-in° Grampp B., sekretariino, S-in° StahlbergerM, kasistino, S-in° Steinmetz, bibliotekistino. Konsilaj membroj: Sr° Barido J., S-in° Oehri J., S-in° Muller M., F-in° Dietz E., S-r° Woerth L.

.../...

La nova komitato atendas la apogon kaj la kunlaboradon de ĉiuj asocio-membroj por la propagando kaj la disvastigo de nia ŝatata lingvo Esperanto.

Jam la 2an jaron "Association Féminine Sociale Evangélique" el Bas-Rhin petis nin organizi E°-kurson en Collège "Lucie Berger". Sr° Zipfel gvidas tiun kurson kun 8 partoprenantinoj. Progresantan E°-kurson gvidas Sr° Barido en "Ecole d'Application", kvartalo Rotterdam, ĉiujn 1an kaj 4an mardojn. Regulaj kunvenoj okazas la 2an mardon de ĉiu monato.

Ne forgesu reguligi la asociajn kotizojn 1974. Dankon!

---

Ste-MARIE-AUX-MINES (68) - Nova klubo kun 6 membroj kreiĝis en la liceo, sekve al iniciato de S-r° Miquel, vic-direktoro de la liceo. La junaj membroj serĉas kontaktojn kun samaĝaj gejunuloj.

---

*NANCY - Parolaj kursoj. Kiel planite 2 informkunvenoj okazis la 14an de januaro en liceo J. Callot (Vandoeuvre-Nancy). Ceestis ĉirkaŭ 80 gelernantoj. S-r° Etienne, lingva instruisto en tiu liceo, organizis poste plurajn informadojn pri E° en la kadro de la 10% da liberaj programoj. Bedaŭrinde regula kurso ne povis okazi sed kelkaj liceanoj lernas perkoresponde. Alia informkunveno okazis en "Centre Social Beauregard", la 25an de januaro. Kurso kun 3 gelernantoj regule okazas ĉiuvendrede.*

*En la centra Junuldomo, 2 kursoj daŭre funkcias, restas 9 gelernantoj el 15.*

*Perkoresponda kurso: 280 personoj ĝis nun petis informojn. 50 aliĝis al la kurso, gvidataj de 17 instruant[illegible]j.*

*N.B. - Eraro aperis en la "Informilo" N°5 koncerne la lernantojn, kiuj last-tem [illegible] finlernis la unuagradan kurson. Finlernis antaŭ nelonge S-r° J. LINDAU en Thionville (57), gvidata de S-r° Chapellier, S-r° Cl. KOFFEL en Bergheim (68), gvidata de S-r° Kletz(Orléans), S-R° S. LIZAMBRI en Longlaville (54), gvidata de S-r° Larrière el Epinal, S-r° LINDAU ekaktivis por esperanto.*

*Gratulojn al ĉiuj!!*

---

BAR-le-DUC - La grupo regule kunvenas. Libro-vendistino en la urbo konsentis afable pruntedoni al ni grandan parton de montro-fenestro en sia magazeno por aranĝi dusemajnan "ekspozicion" pri E-° lernolibroj. Estis decidite prokrasti tiun amikan servon ĝis la venonta lernejjaro, en oktobro, epoko pli favora al eklerhado de la lingvo. La stoko da membrokartoj por simpatiantoj rapide elĉerpiĝas. La grupo proponis, helpeme al la Federacio, enbanderoligi surloke kaj enpoŝtigi la venontajn "Informilojn"

=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=

ESPERANTO-RENKONTIĜO en LA HINGRIE (Rombach-le-Franc) 68

18/19ajn de majo

---

*Kiel jam dum pluraj jaroj, ĉiuj gesamideanoj kaj simpatiantoj estas kore invitataj ĉeesti tiun agrablan renkontiĝon en la montaro kaj naturo. Vi jam povas alveni sabaton post-tagmeze por travivi bonhumoran vesperon apud kamenfajro kaj tranokti surloke.*

*Vi atingas la renkontejon per la "RN 59" ĝis LIEPVRE, de tie vi sekvos la "RD 48" ĝis Rombach le Franc. Meze de tiu vilaĝo vi daŭrigos rekten la vojon al vilaĝeto LA HINGRIE ĝis la kapelo. De tie vi prenos la dekstran vojeton montflanke kaj atingos post 500 m. la "Maison Familiale UFF".*

*Dimanĉon vi ĉeestos senprograman kunestadon, babilante, kantante, muzikante aŭ promenante en la montara naturo. Vi manĝos kaj trinkos tion, kion vi estos alportinta. surloke vi trovos ĉiujn ujojn kaj ilojn, kiujn vi bezonos por kuiri kaj manĝi, eĉ mineralan akvon senkoston. Tiuj, kiuj eble venos per trajno ĝis LIPVRE povos esti transportataj aŭtomobile al la domo, se ili anoncas sin sufiĉe frue al S-r° ZIPFEL, 20 rue Labrogue STRASBOURG, aŭ al S-r° REITTER, 24 rue St-Antoine, 68660 LIEPVRE.*

*Ĝis la revido al LA HINGRIE !!*

=-=-=-=-=-=-=-=-=

SEMAJNFINA RENKONTIGO EN SARLANDO.



Esperantista semajnfino okazos (sabate post-tagmeze kaj dimanĉe) la 27-28ajn de aprilo en la Naturamika Domo de KIRKEL (ĉirkaŭ 10 km oriente de St Ingbert)

Tri programoj: A/ Inicado al E° por germanlingvanoj

B/ Por komencantoj, kun germanlingvaj klarigoj.

C/ Prelegoj por spertaj esperantistoj.

Nur la 3a programo po..as interesi samideanojn de Orienta Francio. Loĝeblecoj je moderaj prezoj en plur litaj dormejoj, manĝoj je 5/7 GM. Por aliĝi aŭ pliaj informoj, turnu vin al S-r° Reinhard Haupenthal, Franz Schubert Str. 26, D 6602 DUDWEILER.

=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-

*ĈU VI DEZIRAS KORESPONDI ?.....*

*F-in° Maria Mihaly, Budapeŝto, XVI Havashalom Str. 8/a, HUNGARUJO - Interesiĝas pri muziko, movadaj aferoj, profesiaj metodoj ktp. - 21 jara, teknika desegnistino en fabriko.*

*Serĉas korespond-amikojn por interŝanĝi bildkartojn pri belaj vidaĵoj el nia lando, S-r° Pranas Didoro, Jurbarkas, P.C. Virkot 12, SOVETUNIO, Litovio (nejuna edziĝinta viro)*

*17-jara lernantino de liceo serĉas sam-aĝan korespondanton. - F-in° Jolanta Plajstek, ul. Umin.kiego 8 m 64, 93 259 LODZ POLLANDO .*

*Leteramik(in)on serĉas 11-jara gimnaziano Michael Hartmann, Schnauferstr. 69, en urbo D-726 CALW en nigra arbaro. Interesiĝas pri vivo en Francio, historio, geografio, ŝakludo, go kaj pli.*

=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=

SI VOUS N'ETES PAS ABONNE A NOTRE BULLETIN *"La Informilo"*, ce numéro est le dernier qui vous parviendra. Veuillez donc être assez aimable pour régler à notre nouveau trésorier, M. GROSSMANN ou au CCP de notre Fédération Culturelle de l'Est pour l'Espéranto, NANCY 1997-72 U, la somme de 5F pour un abonnement simple.

Nous serions très heureux, si vous n'êtes pas membre, que vous choisissiez également une cotisation. Le tableau complet des différentes catégories de membres est paru dans la "Informilo" n° 4 (octobre 1973). Nous vous rappelons simplement les différents chiffres:

*Membres âgés de moins de 25 ans:* *13F - 39F - 56F - 90F*

*Membres de plus de 25 ans:* *13F - 55F - 89F - 123F*

*Tous ces chiffres COMPRENNENT l'abonnement à la "Informilo".*

=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=

LA TEKSTOJN POR LA INFORMILO N° 7 VI BONVOLU SENDI

ANTAŬ LA 10-A DE JUNIO 1974, AL S-r° J.-P. COLNOT

15, rue de Lavaux 54520 NANCY

LAST-MINUTA SCIIGO!

GRAVA ATENTO: PRO LA NACIA BALOTADO LA RENKONTIGO EN LA HINGRIE NE OKAZOS(paĝo 7)

Por respondi al la deziroj de multaj legantoj ni decidis aldoni al nia bulteno distran paĝon, tiamaniere ke la legado fariĝu iom malpli severa.

Tio postulis sufiĉe da laboro al la verkinta cerbumanto kaj ni daŭrigos tiun iniciaton nur se riveliĝas, ke ĝi vekis intereson kaj pleniĝos ian mankon en la bulteno.